

# „Agado pozitiva, agado internacia, agado popola, agado libera“

*Ĉerpaĵoj el la kongresaj paroladoj de Hector Hodler*

(...)

Sed nia Kongreso havas ne nur laboran celon en la senco kiun mi seke resumis. Ĝi ankaŭ celas pliproksimigi la esperantianojn, faciligi ilian reciprokan interkonatiĝon, doni al ili la okazon por amikiĝo kaj interfratiĝo. Multenombraj estis dum la jaro la rilatoj inter niaj membroj aŭ inter niaj reprezentantoj kaj la Komitato, sed tiuj rilatoj estis pure skribaj, malproksimaj, nekonstantaj. Ni opiniis, ke estus plej utile por ni ĉiuj – ĉar ni ĉiuj estas kunlaborantoj – ke al tiuj skribaj rilatoj estu aldonataj la parolaj rilatoj, la persona renkontiĝo, la reciproka sinkonado, kiun neniam anstataŭos la plej perfekta sistemo de interkomunikiĝo. Ni esperas, ke en ĉi tiu direkto ankaŭ sukcesos nia Kongreso kaj ke per la ideoj interne ĉiu homo povas facile kaj memstare sin levi super sia pure nacia pensmaniero kaj idealo por juĝi laŭ pure homara vidpunkto, sed ĉiu homo partoprenanta en la Esperantia vivo vole nevole kun la tempo kaj la ĉiam pli ofta interrilatado kun Esperantianoj estos devigata sin altigi super sia pure nacia kriterio aŭ almenaŭ forĵeti de sia nacia idealo ĉion negativan. Ni per tio konscias, ke ni pli multe laboras por la interpopola paco ol nin turnante al la registaroj kaj petante, ke ili bonvolu ĝin realigi. Ni faras ion multe pli gravan ol multaj tiel nomataj internaciaj konferencoj aŭ Kongresoj: ni preparas la fundamenton, super kiu ellaboriĝos la vera memstara internacia vivo.

Ni cetere ne estas fanatikuloj, kiuj kredas, ke nur Esperantismo alportas bonon al la homaro kaj ke ĝi estas la solvo de ĉio. Tute ne ! Sed ni juĝas, ke ĝi alportas sufiĉe gravan novan valoron, por ke ni laboru ekskluzive kun ĝi, simpatie rilatante kun ĉiuj movadoj, kies celo proksimiĝas al nia, sed irante ankaŭ ĉiam sur nia propra vojo.

Ni ĝis nun ne parolis pri la lingvo Esperanto. Ĝi efektive ludas ĉe ni samtempe malgravan kaj gravan rolon: malgravan ĉar ni malofte parolas pri ĝi – gravan ĉar ni ne povus ekzisti sen ĝi.

La lingvo, por ni, estas nur ilo, ne celo. Ni uzas ĝin same kiel nacioj uzas sian nacian lingvon kaj kiel ili amas sian lingvon, ĉar ili estas ligitaj al ĝi per la tradicio kaj la uzado, tiel same ni Esperantianoj amas nian lingvon, ĉar ni per ĝi malfermis al ni novajn horizontojn, plilarĝigis nian scion, povis rigardi trans la limoj de nia lando, trovi kunhomojn kaj amikojn ĉie en la mondo, malgraŭ la naciaj, rasaj aŭ lingvaj baroj – ĉar por ni jam ne ekzistas tiuj baroj.

Oni kelkfoje riproĉas al ni, ke tiuj ideoj kontraŭstaras al patriotismo kaj kondukas al neniigo de ĝi. Rilate al tio ni nur povas ripeti la vortojn de d-ro Zamenhof en Londono: „Dum la pseŭdo-patriotismo, t.e. la genta ŝovinismo estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konservas, konstruas kaj feliĉigas. La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si.“

Ne, ni ne laboras *kontraŭ* io ajn, sed *por* la homaro, sed ĉar ekzistas homoj, kiuj juĝas sian nacion superan al la homaro, homoj por kiuj la amo al la patrujo estas nutrata ĉefe per malamo aŭ almenaŭ malestimo al la aliaj patrujoj, ni fakte laboras kontraŭ ili. Neniu povas trudi al ni aliajn sentojn al tiujn liveritajn al ni de la sperto. Nia Esperantisma sperto pravas, palpeble pravas, ke sur la neŭtrala fundamento de Esperantismo homoj de diversaj nacioj kaj

lingvoj povas reciproke pace interkomunikiĝi, sen altrudo de siaj naciaj kaj lingvaj apartaĵoj; nia sperto pruvis al ni la falsecon kaj absurdecon de la antaŭjuĝoj, kiujn ŝovinistoj konfesas kiel netuŝeblajn dogmojn ĉu sincere pro manko de tiu sperto, ĉu pro aliaj pli profitigaj kaŭzoj. Ni ne trudas al la aliaj niajn opiniojn, kvankam ni havas bonajn kaŭzojn ilin kredi pli saĝaj, sed oni bonvolu nin ne senbaze kulpigi pri tio ke niaj ideoj kontraŭstaras al patriotismo, ĉar niaj spertoj sincere montras al ni unue, ke ni ne povas akcepti kiel veraĵojn absolutajn ĉion, kion en la nomo de pseŭdo-patriotismo rakontas ŝovinistoj, due ke la plej diversaj nacioj sen helpo de kanonoj kaj similaj defendiloj povas frate interrilati en konstanta maniero, kondiĉe ke ili tion faru sur neŭtrala fundamento akceptebla de ĉiuj.

Mi provis skizi al vi la esencajn ideojn de nia Esperantisma movado. Longatempe, tro multaj el niaj samideanoj, sentante tiujn ideojn, silentis pri ili; tro longe ili atentis ekskluzive pri la lingva formo, konsiderante la internan ideon de Esperanto kiel ion flankan. Nia Asocio estus io senvalora kaj senanima se ĝi sekvus tiun agadon, sub la preteksto ke la interna ideo povus forigi de ni kelkajn tiel nomatajn, timemajn personojn; la personojn, kiujn povas timigi la interna ideo de Esperantismo, ni tute ne deziras en nia Asocio eĉ se ili tre bone parolas Esperanton ! Ni antaŭ ĉio bezonas konsciajn membrojn kaj *samideanojn*, en la vera senco de l'vorto. Ni bezonas kunlaborantojn fervorajn kaj sagacajn. Kie ni ĉefe trovos ilin ? Vi ja ĉiuj konstatis, ke niaj plej multaj Esperantianoj estas homoj el mezaj klasoj: laboristoj, instruistoj, oficistoj, ĉar al tiuj homoj Esperantismo servis, ĉar per ĝi ili pliriĉigis sian sperton, ĉar ili trovis en ĝi ion, kiu samtempe kontentigas ilian idealismon kaj iliajn pozitivajn praktikajn bezonojn. Sen ekskluziveco ni do turnas nin precipe al la popolo, al ĝi ĉe kiu vivas la necesa idealismo kaj sindonemeco por la longa batalado, al ĝi ĉe kiu ni samtempe trovos la fervorajn laborantojn, per kiuj sole niaj ideoj povas efektiviĝi. Se al la antaŭenigo de tiu idealo, se al la plifortigo de Esperantismo povas helpi tiu manifestado, vivo la unua Esperantia kongreso ! Vivu Esperantismo !

Parolado de Hector Hodler ĉe la 1a Kongreso de UEA

Aŭgsburgo 1910

Publikigita en *Esperanto*, 5 septembro 1910

\* \* \*

(...)

Je la momento kiam ni iniciatis la fondon de U.E.A., nia movado estis en plena krizo. En nia tendaro regis konfuzo, necerteco kaj eklaciĝo. El diversaj flankoj aŭdiĝis eĥoj de koleraj voĉoj, de reciprokaj akuzoj kaj atakoj; nia lingvo, kiu estis la sola ligilo de unueco, estis minacata en sia vivo mem per trompallogaj teorioj; komencis la krepusko de kelkaj idoloj. Ni opiniis, ke la facileco kun kiu povis esti endanĝerigata nia afero havis kaŭzojn pli profundajn, ol la intrigoj de tia aŭ alia persono, aŭ pure gramatikaj demandoj. Ĝi kuŝis ĉefe en la manko de uzado de nia lingvo, en ĝia ne sufiĉe profunda enradikiĝo ĉe la popolo Esperantista. Dum multaj jaroj la Esperantistoj propagandis sian lingvon, donis sian tutan atenton al ĉiuj institucioj, kiuj celis ĝian disvastiĝon, sed ili fakte tre malmulte zorgis pri ĝia uzado, ĝia vivo; ne posedante simplan kaj internacian organizon, sed multe da malfortaj kaj disigitaj

organismoj, ili agis ofte sen plano kaj sen metodo. Tamen la vivado en tiuj organizaĵoj, la plifortigo, kiun al nia lingvo alportis la internaciaj kongresoj, la diversaj materiaj interesoj, kiujn kreis kelkaj jaroj de Esperantista agado kaj – ni ne forgesu ĝin – la amo mem al Esperanto kaj ĝia interna ideo, estis kreintaj, je la epoko pri kiu ni parolas, sufiĉe fortan fundamenton, por ke ni povu rezisti al la danĝero de disiĝo, sen kelka kaoso. Sed ĉiu krizo, eĉ venkita, alportas siajn instruojn. Precipe el ĉi tiuj naskiĝis U.E.A. La unua estis, ke nia lingvo estis ne sufiĉe uzata: oni ĝin konsideris pli kiel projekton prezentotan al la mondo ol kiel lingvon vivantan kaj havantan per si mem propran utilon. La dua instruo estis, ke por uzi ĝin kaj ĝin disvastigi, estis necese kunigi en unu internacia fasko ĉiujn ĝis nun disigitajn elementojn, krei inter ili praktikan servaron, starigi, flanke de la ekzistanta lingva unueco, la organizan unuecon. Tia estis nia intenco, kiam ni fondis U.E.A. (...)

Se vi sekvis la resuman historion, pri kiu mi raportis al vi, vi do konstatos, ke nia primitiva intenco estas organizi la tutan Esperantistaron, tute egale ĉu por peresperanta aŭ poresperanta agado, kaj se U.E.A. sin limigis al pure peresperantaj aferoj, tio estas simple por ne konkurenci kaj ne sin enmiksi en instituciojn, kiuj ne volis labori kun ĝi. Sed tian staton ni konsideris kiel provizoran, tiom pli ke trijara sperto montris al ni la neeblecon nete diferencigi la peresperantan kaj la poresperantan agadon. (...<sup>1</sup>)

Al la personoj, kiuj argumentas, ke oni povas tute nete diferencigi la per- kaj la poresperantan movadon, ni rimarkigas, ke la praktiko montris la neeblecon de tia neta diferencigo. (...) Reciproke, peresperantaj organizaĵoj vole-nevole agas por Esperanto. La peresperanta kaj poresperanta agadoj estas tiel intime kunligataj, ke krei por ĉiu el ili internacian organizaĵon estus senĉesa fonto de konfliktoj pri kompetenteco, de malcerteco kaj malordo.

Sekve de tiuj konsideroj, la Komitato de nia Asocio opiniis, ke por la bono de nia tuta afero, plej dezirinda estas la starigo de unu sola internacia organizaĵo. (...)

Ĝis alia ŝanĝo intervenos en la supre klarigita situacio, nia devo estas klara: ni daŭrigu nian ĝisnunan laboron, kun tiom pli da energio kaj persisto. Sed la estonteco de nia tasko dependas ne de ni sole, kiuj estas la plenumantoj de viaj deziroj, sed de ĉiuj niaj kunlaborantoj, de ĉiuj niaj membroj. De la unuaj kiel de la aliaj ni bezonas efektivan, konstantan helpadon, aktivan kaj iniciatan kunlaboradon. Ju pli ni iras antaŭen, despli konvinkitaj ni estas, ke la sorto de Esperantismo estas ligata kun la sorto de U.E.A. Do de via unueco, de via fervoreco, de via laborado dependas grandparte la etonteco de nia afero. (...)

Parolado de Hector Hodler ĉe la malferma kunveno de la 2a Kongreso de UEA  
kadre de la 7a Universala Kongreso de Esperanto  
Antverpeno 1911  
Publikigita en *Esperanto*, 20 septembro 1911

\* \* \*

(...)

---

<sup>1</sup> En la sekvo Hodler esprimis sin kontraŭ la ideo starigi du konkurencajn Esperanto-organizaĵojn en formo de unu peresperanta kaj unu poresperanta.

Agado pozitiva.

La unua principo estas, ke ĉe ni, ĉio dependas de la agado. En ĝi ni trovas la sankcion de nia penado; el ĝi ni ĉerpas la instruojn kaj la necesajn spertojn; per ĝi ni mezuras la socian valoron de la homoj kun ni laborantaj. Ĉiu diskutado devas celi difinitan agadon.

U.E.A. laŭ sia statuto celas plimultigi la rilatojn inter la diversnaciaj homoj kaj krei inter ili fortikan ligilon de solidareco. Ni neniel propagandas, ke tio estas dezirinda: tiu prediko, eĉ elkovente farita, kondukus al neniu pozitiva rezultato<sup>2</sup>. Ni penas plenumi laboron pli modestan kaj pli malfacilan: ni klopodas efektiviĝi nian celon – la celon de Esperantismo mem – en maniero tre relativa, sed praktika kaj palpebla. Por plimultigi la rilatojn inter la homoj ni multigu la okazojn por reciproka alproksimiĝo, ni kreu por ili novajn servojn, materiajn sed de ĉiuj uzeblajn; ni instigu ĉe tiuj homoj novajn kaj samajn bezonojn, kiuj plifortigos la solidarecon inter ili. (...)

Agado internacia.

Tio nin kondukas al alia karakterizo de nia agado, ebla nur per Esperantismo: nia agado estas absolute internacia. Ni turnas nun al ĉiuj bonvokemaj homoj, kiuj super ĉiuj landolimoj deziras grupiĝi por reciproka sinhelpado kaj sinkonado.

Sur la neŭtrala bazo de Esperantismo ni povis facile interrilati kun reprezentantoj de ĉiuj popoloj. Tra la neevitebla diferenco de la naciaj pensmanieroj ni konstatas, ke la esencaj sentoj, la veroj, la devoj, la ĉiutagaj priokupoj estas la samaj; pri tio konscias nun en ĉiu lando pli kaj pli granda nombro da homoj, kiuj estas pretaj kunlabori kaj servi unu la alian sen atento pri la naciaj kaj rasaj baroj. En tio utile intervenas nia organizaĵo, kiu prezentas komunan agadkampon al tiuj internaciemaj homoj de ĉiuj landoj; ili povos tiom pli facile aliĝi al ĝi, ke dank'al la principoj de Esperantismo al ili ne estos trudataj la apartaĵoj de tiu aŭ alia popolo. Interne de nia organizo ili sentos sin egalaj membroj, de sama rondo, ne diversnaciaj.

Tiu praktika internaciismo, realigebla senskue en la nuna stato de la monda organizo, ne estu konfuzata kun la teoria internaciismo brue laŭdata kaj mallaŭdata, sed tre ofte malpreciza kaj pure negativa. La internaciismo de U.E.A. estas pozitiva; ĝi ne konsistas el vortoj, sed el agado. Se ni volas, ke la vivo internacia estu io alia ol motivo de paroladoj, ni devas klopodi por ĝin realigi, antaŭ ĉio krei inter la homoj praktikan servaron, ligi ilin per organizo, insisti pri tio, kio ilin unuigas. Ekster tio ni vidas nur vanajn alvokojn pri frateco, konfuzajn aspirojn, kies rezultaĵoj estas sensignifaj.

Aliparte ni grupigas nur la homojn, kiuj deziras esti grupigataj. Antaŭ ol proponi al la mondo ideon, kiel ajn bela ĝi estas, ni vidu, ĉu ĝi estas realigebla por limigita nombro de homoj. Tiun eksperimenton plenumas U.E.A. en tre modesta mezuro. Se tiu eksperimento sukcesas, nia organizaĵo per sia forto reagos eksteren kaj progresos; se ne, ĝi dissolviĝos. La unua metodo: prediki al la mondo kaj poste realigi, estas la metodo de la teoriistoj. Oni ĉiam estas prava, kiam oni nur bezonas aserti. Ni preferas la duan: agi unue, poste prediki... se tio estas ankoraŭ necesa. (...) Ni cetere ne kredas, ke nia agado havas kiel konsekvencon la fratecon inter la homoj – pruvon de tio pli ofte ol necese liveras nia movado mem – ni nur celas plifaciligi iliajn rilatojn, doni al ili la okazon interŝanĝi ideojn kaj servojn. Ĉu el tio naskiĝos inter tiuj homoj sento de frateco estas tute alia demando, kies solvo dependas de aliaj kondiĉoj.

Agado demokrata

---

<sup>2</sup> Nuntempe oni dirus rezulto.

Ni alvenas al alia karakterizo de U.E.A.; ĝi estas demokrata unue en sia organizo, due en sia spirito. Tiu sistemo necesigas konscian membraron, kies ĉiu individuo klare perceptas sian parton de respondeco en la vivado de la organismo, kies ano li estas. En tia organizo la disciplino estas ne jam trudata de ia ekstera aŭtoritato, sed memvole konsentata de la membroj en la ĝenerala intereso, kiun ili mem difinas. Nenio estas pli kontraŭa al la demokrata spirito, ol la sistemo, kiu plimultigas la diskutojn, metas la oficojn en la manojn de multnombraj komitatoj kaj dispecigas la respondecojn. (...) La longaj diskutoj laŭ la parlamenta tipo, kiuj perdigas tiom da tempo al multaj organizaĵoj, estas anstataŭataj per la referendumo kaj iniciatraĵo uzablaj de la kompetentaj personoj, tio estas de la Delegitoj. Nia organizo cetere ne estas fiksata laŭ netuŝeblaj principoj: ĝi estas precipe la frukto de la sperto kaj de la necesaj; tial ĝi restas fleksebla kaj facile adaptiĝos al la novaj bezonoj, kiujn eble naskos nia estonta agado.

#### Agado libera

Ĉu ni devas aldoni ankoraŭ alian karakterizon? Nia agado estas libera. Ni ne turnas nin al la registaroj, sed antaŭ ĉio fidus al ni mem kaj al la fruktoj de nia libera agado. Tio ne signifas, ke en diversaj okazoj nia organizaĵo ne povas serĉi apogon ĉe la ŝtataj aŭ urbaj aŭtoritatoj, kiel tio jam diversfoje okazis, sed eraro estus doni al nia agado nur tiun celon. Unu el la plej vanaj iluzioj estas la kredo, ke homaj leĝoj, eĉ kreitaj kun la plej laŭdindaj intencoj, povas ion krei kontraŭ la malfavoro aŭ la malpreteco de la popoloj. Ni ne celu la kreadon de surpaperaj leĝoj, kiuj favorus nian movadon; tiuj leĝoj estas senpotencaj, se ili ne trafas publikon jam favorigitan kaj se ili ne estas konstante kaj praktike subtenataj de elprovitaj organizaĵoj.

Antaŭ ol trudi al la mondo Esperanton por la registaroj, ni laboru por trudi ĝian uzadon al la homoj, kiuj jam venis al ni. Kiam ekzistos sufiĉe potencaj internaciaj organizaĵoj, kiuj praktike uzos Esperanton, kiam ni estos vera forto, ni povos ricevi helpon de la registaroj tiom pli facile, ke ni povos vivi sen ĝi.

Agado pozitiva, agado internacia, agado popola, agado libera, jen estas la formulo, kiu gvidas nian laboron kaj, laŭ kiu ni dezirus, ke niaj amikoj direktu sian agadon. Granda tasko staras antaŭ niaj okuloj. Por ĝin plenumi ni bezonas antaŭ ĉio fidelajn kaj seriozajn kunlaborantojn, ni bezonas homojn, kiuj timas nek laboron, nek agadon. (...)

Sed ne sufiĉa estas ankoraŭ la nombro de tiaj modestaj kaj necesegaj kunlaborantoj kompare kun la farotaj taskoj. Tro multaj inter ni ne ankoraŭ vere sentis la gravecon de Esperantio; ĉe la neesperantista publiko tro multaj ne estas ankoraŭ klare informataj pri ideoj kaj faktoj, reprezentataj de U.E.A., kiun ili malĝuste konsideras kiel ian pure lingvan organizaĵon. (...)

Ĉiam rememoru, ke la faktoj naskas la teoriojn, ne la teorioj la faktojn; irante senŝancele nian tre klaran vojon, plenumante bonhumore nian modestan ĉiutagan taskon, ni paŝon post paŝo, kun via helpo, faros el U.E.A. vere fruktodonan socian forton, kiu ludos atentindan rolon sur la kampo de la homaj interrilatoj.

Parolado de Hector Hodler ĉe la 3a Kongreso de UEA  
kadre de la 8a Universala Kongreso de Esperanto  
Krakovo 1912  
Publikigita en *Esperanto*, 20 septembro 1912

\* \* \*

(...)

La intergenta paco, kiu estas tiel necesa por nia progresado, estis longe rompita sur parto de Eŭropo, kie nia afero iam prospere disvolviĝis, kaj ofte niaj koroj tremis je la penso, ke la fantomo de pli ampleksa milito povus enkorpiĝi kaj por longa tempo nuligi multjaran nian paciencan laboradon. Tiu terura timindaĵo feliĉe ne okazis, sed la ondo de ŝovinismo, kiu trapasis Eŭropon, la atmosfero de malpaco kaj sango, en kiu ni vivadis, nedubeble malhelpis la antaŭeniron de nia afero. Nuntempe, sub la influoj de aluditaj okazintaĵoj, ni devas konstati malprogreson de la internaciemaj ideoj, je kies irado – kian ajn opinion oni havas pri Esperantismo – estas intime ligata nia movado. Kiam aŭdiĝas la bruo de la armiloj, kiam ĉiu estas konvinkita, ke la sovaĝa batalo de la homo kontraŭ la homo devas anstataŭi la batalon de la homo kontraŭ la naturo kaj la mallumo, tiam ni ne esperu, ke multe progresos nia afero, kiu baziĝas sur intima trankvila kunlaborado de la homoj el ĉiuj gentoj kaj el ĉiuj nacioj. Teorie, oni ĉiam povas aserti, ke Esperanto, estante nur lingvo, povas servi egale por la paco kiel por la milito; praktike, neniu senpartia homo povas nei la parencecon de la internaciemaj movadoj kun nia. (...<sup>3</sup>)

Ni insistas pri tio, ke UEA devas havi popularan karakteron. En la granda nombro da internaciaj organizaĵoj kaj institucioj, kiuj kreiĝis en la daŭro de la lastaj jaroj, tro multaj limigas sian agadon je pure sciencaj aŭ teoriaj laboroj, kiuj havas intereson nur por malmultaj homgrupoj. Estas la honoro de Esperantismo, ke ĝi penas anstataŭi la pure teorianternaciismon per praktike travivata internaciismo, kiu, ne embarasante sin per formuloj aŭ doktrinfasadoj, rilatigas fremdulon kun fremdulo pri ĉiuj sferoj de la homa vivo, sur vere neŭtrala kampo. Per sia interŝanĝado de servoj ĉiujare pli multe uzata, U.E.A ne sole donas propran profiton al la uzantoj de tiuj servoj, sed ĝi praktike instruas al ili internacian spiriton, t.e. klarajn ideojn kaj ĝustajn konojn pri la vivo kaj mentaleco de la diversaj popoloj, sen kio ĉia alia jura alproksimiĝo estas neplenumbla en vere sincera maniero. (...)

Ĉu de tio ni devas konkludi, ke nia afero, jam vivanta per si mem, devas resti aparta mondeto kun sia ĉiam sama limigita publiko? Ĉu ni devas rigardi nur internen de nia afero kaj enprofundiĝi en la kontenta admirado de tio, kio estis farita? Tio estus vere danĝera eraro, kies rezultato baldaŭ estus dormado parenca kun morto. Ni kontraŭe devas etendiĝi, plifortiĝi, progresi. Niajn servojn ni devas plibonigi kaj plimultigi, nian membraron ni devas pligrandigi. Tio estas nia sankta devo al ĉiuj, kiuj venis antaŭ ni, kiuj senlace laboris kaj multon oferis, por krei tion, kio ekzistas. Tio estas nia devo antaŭ la homaro, ĉar, sciante, ke ni laboras por io utila ne sole en la estonto, sed jam en la nuna tempo, ni havas la taskon fari tion utila por kiel eble plej multaj homoj. Akiri novajn membrojn, agi ekster la Esperantista jam ekzistanta publiko, ŝajnas al ni la plej urĝa necesaĵo. En tro multaj lokoj nia afero dormetas aŭ vivas tro trankvile. En tro multaj lokoj oni sin okupas nur pri bagateloj aŭ – pli grave – disputadas senfine pri neniaĵoj aŭ personoj. (...)

Ne per bruaj momentaj agoj ni utile laboros, sed per longa pacienca individua laborado, ĉar kiel antaŭdiris la poeto: „Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.“ (...)

Organizaĵo estas nepre necesa por efika kunlaborado, taŭga dispartigo de la taskoj kaj orda agado, sed, eĉ, se ĝi estas bonega en si mem, ĝi valoras nenion, se la individuoj, el kiuj ĝi konsistas, estas seniniciataj kaj indiferente fordonas ĉiun laboron al la aliaj. Tio estas elementa veraĵo, kiu malgraŭ sia banaleco ne ĉesas esti rememorinda. (...) En la nuna tempo plej necesa estas la plimultiĝo de niaj membroj. (...) Niaj progresoj venos ĉefe per la

---

<sup>3</sup> En la sekvo Hodler traktis la malfacilan financon de UEA.

individua agado de vi ĉiuj. (...) Ni ne parolas pri kolektiva propagando, sed pri individua agado, kiu estas nuntempe necesega, se ni volas progresi. Dum la jaro ĉiu el vi energie penu varbi unu novan Esperantianon. Por tio estas necesaj nek multe da lernolibroj, nek multe da societoj, sed la viva parolo, kelkaj klarigoj, kiujn abunde liveras niaj diversaj propagandiloj, kaj persista fervoro. (...)

Ni do estas multe pli bone armitaj ol antaŭe, sed ni ne forgesu, ke eĉ la plej perfektaj armiloj perdas sian efikon, se ili estas en la manoj de nespertaj, molaj kaj skeptikaj soldatoj. De vi ĉiuj dependas la estonteco de nia afero. Kiel ajn utila estas en si mem organizo, ĝi valoras nur se la homoj, el kiuj ĝi konsistas, konscias pri sia respondeco kaj plenumas sian devon kontinue, inteligente kaj ame. Tiel same, UEA potenciĝos kaj povos alpaŝi al pli gravaj taskoj nur per konscia membraro, fervora, iniciatkapabla kaj energia reprezentantaro.

De via individua agado dependas nia progresado.

Parolado de Hector Hodler ĉe la 4a Kongreso de UEA

kadre de la 9a Universala Kongreso de Esperanto

Berno 1913

Publikigita en *Esperanto, Kongresa Gazeto*, 27 aŭgusto 1913